

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono Kĉ 20.—, eksterlande Kĉ 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kĉ 2.—
 ĉi 2 resp. kuponoj. — Gvidas redakcia konsilantaro. — Redakcio: Plzeň, Houšková ul. 32. — Admi-
 nistrejo: Frant. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso ĉs. n-ro
 5203, aŭstria n-ro 169.352. — Telefono: 732/VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

A.B.:

NIA Batalo.

Senĉesa batalo plenigas la historion de homaro, batalas individuoj, socioj, nacioj ĉe grupoj de nacioj. Kaj serĉante la kaŭzon ni ĉiam ekscias, ke ĝi estas libereco, ĉi kiu oni verŝadis sangon kaj pro kio kaj pro kio kaj plimultigo riskis la homo sian vivon. Libereco estas multvalora trezoro, ĉi tiun ni deziregas kaj kies perdon ni malvolonte bedaŭras. Klopodo de individuo, ĉi kiu por si mem kiel eble plej grandan liberecon ĉiudirekte, kondukas ĝinaltio, ke ĝi subpremas la liberecon de siaj proksimuloj kaj tiuj memkompreneble rezistas subpremadon — la batalo komenciĝas. Same estas ĉe socioj eĉ tutaj nacioj. Ofte okazas, ke venkas perforto, sed tia venko ne estas konstanta, multe pli valora estas la venko morala, la venko kultura.

Oni batalas pro libereco ekonomia, religia kaj nacieca. Religiaj bataloj estas jam preskaŭ forigitaj, sed estadis tempoj, kiam homoj pro religio mortigadis sin reciproke, ĉi tiuj religiaj fanatikuloj penis perforte altrudi sian kredokonfesion altutamondo. Tiuj tempoj jam forpasis kaj nun ni aprobas, ke religio estas propra intereso de ĉiu individuo kaj ke estas plej ĝuste lasi al ĉiu plenan liberecon koncerne la religion kaj tute nin ne emocias, se ni ekscias, ke nia najbaro estas alikonfesano aŭ tute senkonfesa aŭ ke li ŝanĝis la konfesion. Sed tute alia estas la afero rilate la naciecon, ĉar ĉi tiu estas al ni egale, se iu denaciigas.

Esenca signo de nacieco estas nacia lingvo kaj tiun ĉiu nacio timangore gardas kaj ne permesas, ke ĝi estu de alia nacio subpremata, kontraŭe ĝi ĉiam klopodas,

ke ĝia lingvo pli kaj pli multe disvastiĝu kaj akiru la respekton de aliaj nacioj.

Ĉiu eĉ plej malgranda nacio estas fieraj je sia lingvo, des pli la grandaj nacioj. Pro tio ne surprizis nin la konflikto, kiu aperis en packonferenco en Washington pro tio, ĉi trakti en franca lingvo, laŭ ĝistiam kutimo, aŭ en angla lingvo. Certe ĉiu esperantisto, leginte raporton pri tio, ekpensis: »Kiel bele aspektus, se oni traktus en tia internacia konferenco esperante! Neniu nacio sentus sin forpuŝata, eĉ ne tiu plej malgranda. Ĉu ni atingos ĉi tiun celon, ĉu tio ne estas utopio?«

Por ni estas tio idealo, por kiu ni laboras per ĉiuj fortoj, zorgante nek pri malrespekto nek pri mokridoj de »inteligentuloj«, kiuj rifuzas nian lingvon, kiam ajn ili pri ĝi ion legas aŭ aŭdas, sed kiuj ne dediĉas eĉ kelkajn horojn por ekkoni la principojn de nia lingvo. Ni estas firme konvinkitaj, ke tiu idealo fariĝos realeco, ke esperanto estos aprobita kiel interkompreniganta lingvo de ĉiuj nacioj. Tio estos plej bona respondo al niaj kontraŭuloj, kiuj ne povas imagi, ke artefarita lingvo estas kapabla fariĝi lingvo vivanta kaj de ĉiuj uzata. Al ni estas esperanto brilanta stelo, kiu ravas ĉiam pli kaj pli multe da anoj kaj kiun ni konscie sekvas, ĉar ĝi kondukas nin al kultura progreso. Dum benata paco povas la kulturo progresi, kontraŭe dum milito ĝi haltas aŭ malprogresas, kiel esprimas roma proverbo: »Inter arma silent Musae« (dum milito silentas la artoj). Kaj esperanto estas unu el la plej gravaj porpacaj rimedoj. Tamen multaj ne komprenas ĝian gravecon kaj ĝi devas batali kun tia nescio. Esperanto kaj batalo? Sed vere ni devas batali, kvan-

kam sen glavo kaj sen perforto, sed per raciaj argumentoj kaj pruvoj, por konvinki niajn malfavorantojn pri efektivegbleco de nia idealo.

Krom tio ni devas forpuŝi atakojn de senperaj kontraŭuloj, kiuj konsideras alian lingvon pli taŭga kiel internacia lingvo. Tion faras idistoj. Ili sukcesis elpostuli de ĉefoslovaka ministerio de instruado kaj nacia klero permeson, instrui idon en lernejoj same kiel esperanton, ili ja eĉ klopodas parolkonvinki la mondon, ke la permeso estas sekvo de tio, ke nomita ministerio konvinkiĝis dum XIII-a esperantista kongreso, ke ido estas pli taŭga ol esperanto, kvankam vera kaŭzo estas bazita sur neinformiteco kaj indiferenteco.

Multajn malamikojn ni havas, sed ni havus certe pli multajn amikojn, se ni sukcesus konvinki ilin pri utileco de nia lingvo, aŭ almenaŭ vekti la intereson pri ĝi; tiam estus nia sukceso garantiata. Do kion fari? Altrudi perforte al iu esperanton ne estas eble. Sole la komercistoj kaj industriistoj povas postuli, ke iliaj alilandaj liverantoj korespondu kun ili esperante; tiu propagando estus tre sukcesplena. La foiraj oficejoj helpas al ni, ĉar ili akceptis esperanton kiel korespondlingvon. Alie ĉiu estos plej multe utila al esperanto, se li montros al neesperantistoj, kion li gajnis per esperanto, ke li ellernis per ĝi diversajn sciojn, ke li povas per ĝi pli facile informiĝi pri rilatoj en fremdlando kaj kompreniĝi tre facile kun kiu ajn fremdulo scianta ankaŭ esperanton; tiam li vekos en neesperantisto la deziron lerni ankaŭ tiun mirindan lingvon. Sen trograndigo ni povas diri, ke inter esperantistoj estas plej grandparte idealistoj, kiuj celas plialtigon de sia kleriĝo kaj bonon de tuta homaro. Ĉiu devas konfesi, ke la homo, okupanta sin serioze pri esperanto, ne povas esti neklerulo kaj ke li per legado de diversnaciaj gazetoj kaj libroj, per korespondado eĉ per persona interrilato kun fremduloj pli bone orientiĝas en la mondo ol alia, kiu vivas nur en malvasta spirita sfero. Krom tio zorgu ĉiu samideano pri sia universala kleriĝo, ne malatentu kiun ajn okazon por ĝin plialtigi, por ke la esperantistaro estu konsiderata inteligentularo kaj ne nur aro de fanatikuloj. Kulturo estas plej valora posedaĵo, atingebla nur per propra pena laboro, ne per mono kaj per laboro de aliaj. Ĉi estas rimedo, kiu helpas al ni plej

multe en nia batalo, ĉar ju pli inteligentaj ni estos, des pli grandan respekton ni atingos en la tuta mondo. Pro tio nia devizo estu:

Per kulturo al venko!

ooo

J. S. MACHAR:

HELIANTO.

Trans la ĝardenbariloj en kampar',
ĉe gardistejoj apud la fervoj'
la oran kapon alten levas vi,
ho, floro, al vizaĝo de la sun'.

— Do, kiel ĝi okazis en Helas',
en tempo, kiam Olimpanoj mem
la homoj vizitadis sur la ter'?

Nu, tiam vivis reĝo — maljunul'
kaj li filinojn ĉarmajn havis du,
kaj unu, la orhara Klytia,
fariĝis amatin' de Helios,
la dio de la suna veturil'.

Maldaŭra tamen estas ĉia am'
— almenaŭ vira am'! — kaj montros tuj
la sorto de l'orhara Klytia,
ke ne pli bonaj estas dioj eĉ.
Sur tera kampo paŝas Olimpan',
li vidas ĉarman floron, klinas sin,
ĝin ŝiras kaj alflaras — ĵetas for —
kaj ree li alian serĉas jam.

Fratinon vian vidis Helios,
la palan, nigrakaran Leŭkothe,
je via malfeliĉo, Klytia!

Li vidis ŝin — adiaŭ, Klytia!
Pli frue tiel kara, lia am'
vin turmentegis, ĉar vi sciis ja,
ke nun fratino via ĝuas ĝin.
Kaj ĉiu sonĝo, ĉiu rememor'
al vi alportis multe da sufer'.
Kaj se vi venis al konata lok',
jen kvazaŭ nudapaŝe irus vi
sur dornoj — rozojn vi ne trovis plu . . .

Vi kuris al la patro, Klytia,
malkaŝis vi la amon de l' fratino,
kaj laŭ ordono de la maljunul'
en tombon estis enfosita tuj
la pala, nigracara Leŭkothe,
kaj kun ŝi ankaŭ via ĵaluzec' . . .

Sopire vi atendis, Klytia,
ke nun li certe revizitos vin
sur la altaĵo . . . Sed ne venis li.

Vi lian veturilon vidis nur
 kaj oran brilon ĝian sur ĉiel'
 kaj supren vi rigardis kun sopir',
 ĝis via nuko rigidiĝis jam —
 li preterpasis, al la vasta mar'
 li proksimiĝis — kaj atendis vi . . .

En viajn harojn falis nokta ros',
 lian oron ofte kaŭzis vent',
 sed vi atendis kaj ne zorgis ĝin.
 La lacan kapon vi returnis nur
 al tiu flanko, kie la Aŭror'
 malfermos pardonon per la roza man' . . .

Li ekveturis tra l' azura voj',
 kaj via kapo ĉiam sekvis lin,
 okulo via plena de dolor,
 rigardon unusolan volis nur —
 sed vane . . . Li veturis al la mar'
 kaj malaperis . . . Kaj atendis vi.

Sed li kompatis — tia do kompat'
 almozo estis nur por via am' —
 kaj ŝanĝis vin je floro, ho, knabin';
 jen sorto ja de ĉiu terloĝant',
 kun kiu ekrilatis la diar' . . .

Sed en vi plue vivis via am',
 kaj plue sekvis via ora kap'
 la oran veturilon de l' karul'.

Ho, Klytia, nun ne veturas plu
 delonge jam sur la ĉiela voj'
 la kara, la helhara Helios;
 la nemortema dio mortis jam,
 dezerta estas la Olimpo nun —
 sed vi ne scias ĝin, kaj via kap'
 sin plue turnas al la veturil',
 kaj se ĝi malaperas post la mont'
 vi klinas vian nukon pro malĝoj'
 ho, Klytia, kaj vi rigardas do
 trans la ĝardenbariloj en kampar'
 de apud gardistejoj ĉe fervoj',
 el tiu tempo de aliaj homoj
 ankoraŭ nun — simbolo de la am',
 epokojn postvivanta, diojn eĉ,
 kaj mute parolanta pri sufer' . . .

Tradukis M. Lukáš.

○○○○

B. BEČVÁŘOVÁ:

SENKOMPATA . . .

(Daurigo.)

Simple homo ekkurus renkonten al la
 gepatroj kiel infano. Tio estas pli intima.
 Ŝi elprofunde elspiris. La luksaj objektoj
 ne plu imponis ŝin. Malvarmon ŝi subite
 eksentis. La servisto haltiĝis. Per penega
 kaj eraroplena bohema lingvo li komu-

nikis de la filo al ŝi jenon: »Sinjorino, nia
 estro ne havas plu la gepatrojn, li deziras,
 ke vi-ne ĝenu lin«.

Ĉi tio estis eraro. La maljunulino venis
 eble en alian domon. Por esti certa ŝi de-
 mandis, kie ŝi estas. La servisto eldiris la
 nomon de ŝia filo. Ŝi tamen ne eraris! Mal-
 honorigita, ŝanceliĝante ŝi estis elirinta
 el la domo. Ŝi prezentis sin kiel patrino
 de »granda sinjoro«. La tuta domo mokos
 ŝin. Kaj la domestro — ne surdiĝos, ne
 blindiĝos pro tio, ke li tiel kondukis. Li
 ne surdiĝos, ne blindiĝos, ĉar li jam de
 longe surdiĝis kontraŭ voĉo de l' konsci-
 enco, blindigis lin fiereco kaj ofendsent-
 emo de tiuj homoj, kiuj de malpotenculoj
 fariĝis potenculoj. Li hontis pro kaptuko
 vestita patrino, kaliĝantaj manoj koleris
 lin, ke tiu simpla kamparanino estus ri-
 proĉanta lin. Li venĝis sin al la patrino
 pro tio, ke ŝi naskis lin.

Malbona kunularo prenis sur sin la tas-
 kon utiligi la kapablojn de la juna de-
 vojiganto, kiujn al li la naturo iam ad-
 mirinda en sia degeneriga gusto, metis en
 sian bruston. Patrino naskis al la mondo
 homon, kaj la marĉo englutis lin. Ĉu la
 patrino mem estis kulpa je tio? Kaj tamen
 ŝi sentis akran dornon en sia koro, kva-
 zaŭ ŝi estus kulpa, kio okazis. Pli bone
 estus, se tiu homo eĉ ne naskiĝus, aŭ se
 li mortus, ĉar la morto ne estas ĉiam plej
 granda malĝono.

Kompatindaj estas tiuj, kiuj perdas la
 infanon sur malĝusta vojo de l' vivo.

Maljunaj gefiŝgardistoj hejme en la
 dometo perdis sian filon. Se li mortus, ili
 havus nun almenaŭ tombon. Tiu neniam
 trompos, neniam malĝojigos nin. La tomb-
 oj paciĝas.

Male, la vivo . . .

Kvazaŭ sonĝante, la fiŝgardistino estis
 forlasinta Vienon. Malplenecon estis en ŝia
 koro, malplenecon ŝi sentis en la kapo. Ŝi
 ricevis bategon en la kapon, en la bruston,
 kiu ŝin senkonsciigis.

»Estimu la patron kaj la patrinojn, por
 ke vi longe vivu kaj por ke vi bone fartu
 sur la tero!«

Kriego simila al freneza ridaĉo, eliĝis
 el la kunpremita gorĝo de l' malhonor-
 igitaj patrino, kiam ŝi sidis en la angulo
 de l' fervoja vagono kaj estis reveturinta
 Bohemion: »Estimu la patron kaj la pa-
 trinojn!« — — —

Sed tiu homo en Vieno ne havas plu la
 gepatrojn. Gemaljunuloj Vjeĥet ne havas
 plu la filon. Ĉu tio helpas iel al la mal-
 estimigitaj gepatroj, eĉ se Dio mem venĝ-
 us laŭ maniero Jehova — — se Li ne re-
 donos la infanon al ili!

Malluma tomba silento enestiĝis en la kabaneto de l' maljuna fiŝgardisto. Se iu demandis pri la filo en Vieno, ili ĉiam trovis iun konvenan elturniĝon; la veron ili ne estis dirintaj, ĉar ili hontis pro sia filo. Post ioma tempo la homoj eksciis la veron kaj tial ili ne demandis plu pri li. Malĝojige estis rigardi la maljunajn geedzojn. La maljunulo fariĝis timema kiel malgranda knabo, kurbiĝis, la filo mal-longigis al li lian vivon je kelkaj jaroj; la nuba, sulkoplena vizaĝo de l' maljunulino pli kaj pli sulkiĝis, kaj ŝi evitadis la homojn.

La geedzoj inter si tute ne parolis pri sia filo. Nur nelonge post la reveno el Vieno iun dimanĉon iris la fiŝgardistino subtegmenten kaj traserĉis la malnovan kofron. Poste ŝi deprenis malsupren lulilon, kaj en ĝi amason da infanaj diversaj aĵoj: vindilon, infankusenon, etan kufeton, disrompitan lignan ĉevaletan, lernejkajerojn, knaban ĉapelon kaj multe da aliaj infanobjektoj. Ŝi ekhejtis kaj unu objekton post alia ŝi forbruligis. La maljuna fiŝgardisto ne estis hejme. — Venis vico je lulilo. La maljunulino kisante kaj karesante la kapon parton de ĝia flanko, ek-lulis ĝin ankoraŭ lastfoje kaj poste dis-hakis kaj metis pecon post peco en la fajron.

La haŭtkoloro de ŝia vizaĝo similis per-gamenon. Ŝi eksidis ĉe la forno kaj rigard-sekvis la konsumiĝadon de tiu lulilo, kiu iam en la revado luladis la kapeton infanan kaj la esperoplenan kapon patrinan... Sekvantan tagon la fiŝgardisto disŝutis la cindron sur glaciĝintan korton, kie ĝi miksiĝis kun koto. Kaj nun en la kabano ĝi aspektis kvazaŭ la gemaljunuloj havis neniam infanon.

Jaroj estis forfluintaj. En la dometo de gefiŝgardistoj Vjehet oni vivis vivon apatian de l' forlasitaj gemaljunuloj kaj ŝajnis, ke je la fino de ilia vivo, nenio plu ilin ekscitos. Dum la tago ili laboris, vespere la maljunulo longe preĝis por la filo, ke li revenu. La maljunulino fruvespere enlitiĝadis. Ŝi ne dormis, sed la maljuna kapo bezonas ripozon. Dimanĉe la maljunulo ekokupis ordinare la lastan henkon en la preĝejo, lia edzino denove sidpasigadis la tempon en la tombejo, ĉe la tomboj de ŝia parenkaro. En la preĝejon ŝi iradis iam nur pro tio, ke oni ne kalumniu ŝin. La tempo iam malrapide treniĝis kiel heliko. —

(Daŭrigo.)

ESPERANTISTA VIVO EN OMSK.

(Eltiro el letero de samideano el Omsk.)

Post la renverso en januaro 1920 estis al la klubo donita ejo en la lernejo, la registaro donacis ankaŭ la meblaron kaj fortepianon. Ni havas nun 4 pagatajn oficistojn (la gvidanton de la mastrumado, administranton, skribmaŝiniston kaj bibliotekiston), sed ni rajtas havigi 8 oficistojn. La prezidanto rifuzis la akcepton de la salajro. La oficado daŭras ĉiutage de la 5a ĝis 10a horo, membraj kunvenoj okazas ankaŭ ĉiutage. Nuntempe funkcias 8 kursoj, la instruistoj ricevas por 1 horo 70 rublojn. La registaro donas regule al la klubo blankan panon, buteron, fromaĝon, kolbason, sukeron kaj teon. Ĝus forveturis en Nederlondon unu kursanino. Ŝi donacis al la klubo sian pianon. Tiamaniere ni nun posedas du pianojn.

En parko sur la strato Atamanskaja ni aranĝis grandan propagandan koncerton kaj publikan paroladon. Eniro estis senpaga, sur la anguloj ĉirkaŭ la parko pendis ruslingvaj kaj esperantaj proklamiloj pri e-o kaj verdaj standardoj. Al la sidanta publiko oni dispruntedonadis flugfoliojn kaj librojn por tralego. De la sepa horo matene ludis la orkestro, aŭdiĝis ankaŭ nia e-a himno. Je la 9a horo antaŭtagmeze, kiam la parko estis plenege, komencis la paroladoj. Parolis ruse Novoselĵov, Maleckij, esperante Najdin. Post la parolado anoncis sin 400 personoj en e-ajn kursojn. La instruistoj de la lokaj lernejoj devige lernas esperanton.



LA MARKIZO DE SAINT-CYR.

Nekonata homo aperis sur barikadoj en Parizo. Oni volis de li legitimacion kaj la homo respondis, ke li ĝin hejme forgesis.

»Do, diru vian nomon!«

»Mi estas sinjoro markizo de Saint-Cyr«*).

»Civitano, ne ekzistas plu sinjoroj.«

»Bone, markizo de Saint-Cyr.«

»Sciu, ni havas nek nobelaron, nek titolojn, do, vi ne estas plu markizo.«

»De Saint-Cyr,« diris nia markizo.

»Ni ne havas plu »de.«

»Do, Saint**)-Cyr, tute mallonge.«

»Ne ekzistas sanktuloj.«

»Cyr, se vi volas.«

»Ni ne havas plu »sire«***), ĉar, ci devas scii tion, ke ni estas republikanoj.«

»Nomu min, kiel vi volas,« diris kun ridado Saint-Cyr. El franca lingvo trad. Riedl.

Rim. de l' trad.

*) France oni ĉiam diras ekz. Monsieur le marquis de Saint-Cyr.

***) Saint — sankta.

****) La prononcado de »Cyr« kaj »sire« estas france egala. »Sire« — titolo de franca nobelaro.

**XIV-a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO
EN HELSINKI — HELSINGFORS (FINNLANDO).
LA 1.-12. DE AUGUSTO 1922.**

**Unua komuniko.
(Daŭrigo.)**

8. **Depono de mono.** Laŭ interkonsento, kiun faros L. K. K. kun la Kongresa Banko (nomo sciigota en la venonta komuniko), la samideanoj, kiuj deziras uzi la nunan tre favoran kurzon por rezervi al si finnajn markojn, povas tuj sendi monon al la kongresa kasisto (sub la oficiala adreso de L. K. K.), kiu ŝanĝos ĝin en finnajn markojn kaj malfermos konton por la aliĝinto. Alvenante ĉi tien dum la kongreso, la aliĝinto-deponinto povos libere disponi sian monon. La banko nuntempe pagas 7% renton por deponita mono.

Pro la nuna malalta kurzo de la finna marko estas precipe por samideanoj en landoj kun alta valuto tre rekomendinde uzi ĉi tiun okazon havigi al si sufiĉe malkaran monon por la restado ĉi tie dum la kongresa semajno.

La L. K. K. ankaŭ jam nun volas atentigi al la estontaj kongresanoj pri tio, ke oni ĝenerale devus eviti sendon aŭ alporton de papermono, ĉar ŝanĝante papermonon oni ĉiam perdas en kurzo. Precipe en Finnlando eksterlanda papermono ne estas volonte akceptata de la bankoj. Ni konsilas al la aliĝintoj laŭeble sendi kaj kunporti monon nur per bankĉekoj aŭ per kreditleteroj. Pro la tre malalta kurzo, uzata de la poŝto, ni insiste malkonsilas sendon de mono per poŝtmandato kaj respond-kuponoj.

9. **Fakaj kunsidoj.** Personoj intencantaj kunvoki specialajn fakajn kunsidojn dum la kongreso estas petataj pri tio kiom eble plej frue informi la L. K. K. samtempe sciigante por kiom da personoj proksimume ili bezonas ĉambron kaj dum kiom da horoj. En la sekvontaj komunikoj estos sciigate, al kiuj personoj la L. K. K. komisiis la lokan organizon de la diversaj fakaj kunsidoj.

10. **Ekspozicio.** La L. K. K. intencas aranĝi dum la kongresa semajno grandan publikan propagandan ekspozicion pri Esperanto.

Por ke ĉi tiu ekspozicio fariĝu kiom eble plej valora, insirua kaj impona, samideanoj ĉiujn tian estis urĝe petataj donace sendi al L. K. K. en Esperanto eldonitajn presajojn, prospektojn, katalogojn, gvidlibrojn, gazetojn, librojn, sigelmarkojn, poŝtkartojn kaj aliajn ekspozindajn esperantajn.

Personoj, kiuj posedas gravajn, maloftajn dokumentojn, precipe pri la unuaj tempoj de Esperanto, kiujn ili ne povas donaci, estas tamen petataj pruntedoni la dokumentojn al la L. K. K., kaj ricevos ilin post la kongreso.

11. **Propagando.** Por fari tre bonan propagandon pri la kongreso, la samideanoj estas petataj kiel eble plej multe aĉeti kaj uzi la kongresajn poŝtkartojn kaj sigelmarkojn. baldaŭ eldonotajn.

12. **Sciigoj al aliĝintoj.** La L. K. K. sendos ĉiujn kongresajn komunikojn presite al ĉiuj aliĝintoj kaj al la Esperanta gazetaro.

13. **«Esperanta Finnlando».** Laŭ interkonsento farita inter la L. K. K. kaj la administracio de «Esperanta Finnlando», la kongresanoj ricevos la nomitan gazeton je specialaj favorprezoj, se ili abonas ĝin samtempe kiam ili aliĝas al la kongreso.

Dua komuniko.

Rimarko. La redakcio ellasis el II-a komuniko sciigojn ne gravajn por ĉeĥoslovakaj samideanoj.

1. **Aliĝo.** En la 1-a komuniko la L. K. K. promesis, ke samideanoj, kiuj jam nun aliĝas, sed pro neantaŭviditaj kaŭzoj ne povos ĉesti la kongreson, ricevos 75% de la pagita kotizo. Post plua pripensado kaj konsiliĝo kun la L. K. K. la L. K. K. tamen trovis tian arangon neebla kaj per tio ĉi reprenas la promeson. La aliĝintoj ne povontaj alveni estas petataj fariĝi helpkongresanoj.

Cetere la L. K. K. denove memorigas la samideanojn aliĝontojn pri la dezirindeco, sendi la aliĝon kaj kotizon kiel eble plej frue, por ke la L. K. K. ricevu monon tuj en la komenco, kiam ĝi estas plej bezona. Aliĝoj sen kotizo ne estas enregistritaj. Pagu per bankĉekoj!

2. **Aliĝis ĝis nun 38 personoj.**

3. **Sciigoj al la aliĝintoj.** La L. K. K. sendas ĉiujn komunikojn aperitajn kaj aperontajn al la aliĝintoj, kaj petas ilin en propra intereso konservi kaj plej atente trastudi ĉi tiujn. Sciigoj donitaj en unu komuniko ĝenerale ne estos ripetataj.

4. **Alvokon,** admonantan «ĉiujn, al kiuj Esperanto-Asocio de Finnlando kaj la L. K. K. sin turnas, subteni laŭ fortoj kaj eblecoj la esperantistojn en ilia respondeca laboro», subskribis 20 finnlandaj eminentuloj.

5. **Kongresa banko.** La L. K. K. faris interkonsenton kun **Osakepankki Ulkomaankauppa varten — Aktiebanken för Utrikeshandel** (Akcia banko por eksterlanda komerco), kiu funkcios kiel kongresa banko kaj malfermos filion dum kongresa tempo en la akceptejo.

La banko jam malfermis kreditivon de 10000 Fmk por la L. K. K. por ĝiaj unuaj bezonoj. La banko ankaŭ konsentis eldoni en Esperanto broŝuron pri la ekonomia vivo de Finnlando, kiu broŝuro estos senpage disdonata al ĉiuj kongresanoj kaj sendata al delegitoj de U. E. A., vojaĝoficejoj, Esperantaj grupoj ktp.

6. **Denono de mono.** Pri tiu detalo ni rememorigas al la 8a punkto de nia 1a komuniko. La mono povas esti sendata ankaŭ senpere al la kongresa banko (adreso Helsingfors), sed en tiu okazo estas dezirinde, ke la sendinto samtempe sciigu al L. K. K. pri la denono.

7. **Blindula kaso.** Atentante al deziresprimo de la XIII-a kongreso en Praha la L. K. K. akceptas vere de la aliĝintoj donacojn por la eldona kaso de blindaj esperantistoj.

8. **Garantia kapitalo.** Ĝis nun estas nititaj sume 2900 Fmk.

9. **Donacoj.** Sume 820 Fmk. Ni volas atentigi al la kongresanoj, ke se ĉiuj aliĝintoj

havigos al la kongresa kaso donaceton egalvaloran al lia kotizo, la financo de la kongreso estos sur firma fundamento.

10. Kongresa afiŝo. La L. K. K. eldonos, laŭ skizo farita de la artisto s-ro Eric Vaström, belan kongresan afiŝon en 3 koloroj, kiu estos dissendata por elpendigo en 9000 ekzempleroj ĉirkaŭ la tuta mondo al la delegitoj de U. E. A., Esp. grupoj, vojaĝoficejoj ktp.

11. Kongresaj poŝtkartoj. La L. K. K. eldonos kongresan propagandan poŝtkarton laŭ la sama bildo kiel afiŝo en 3 koloroj. Ĝia prezo por Ĉeĥoslovakio Kĉ —60.

12. Kongresaj glumarkoj. La L. K. K. ankaŭ eldonos glumarkojn laŭ 3 diversaj desegnaĵoj, faritaj de la artisto s-ro Eric Vaström. Prezo por 1 folio 3 Kĉ. Samideanoj, aĉetu! uzu!

13. Kotizoj kaj prezoj. La preztabelo valoras nur al aliĝantoj.

Ĉiu pagas en la valuto de sia lando.

14. Ekskursoj. Dum la kongresa semajno ekskursoj — krom en la apudajn ĉirkaŭaĵojn de la urbo — verŝajne ne okazos, pro la longaj distancoj. Sed la L. K. K., en kunlaboro kun la **Turista Societo de Finnlando**, penas aranĝi diversajn turistajn ekskursojn antaŭ kaj post la kongresa semajno, kaj petas la samideanojn-aliĝantojn sciigi, ĉu ili povos kaj dum kiom da tempo, resti en Finnlando antaŭ aŭ post la kongreso, kaj kiujn specialajn dezir-ojn ili havas koncerne la pasigon de la tempo ĉi tie. La L. K. K. penas doni ĉiujn deziritajn informojn.

15. »Vojaĝo en Finnlando«. En komenco de venonta jaro estos reeldonata, en kunlaboro kun la Turista Societo de Finnlando la ilustrita gvidlibro »Vojaĝado en Finnlando«, kiu interese priskribas la vidindaĵojn de nia lando. La teksto estos tute nova kaj pli-grandigita, kaj la ilustraĵoj multaj kaj belaj.

16. Gazeta propagando. Ĉar estas dezirinde fari propagandon pri la XIV-a ne nur en la Esperanta gazetaro sed ankaŭ en la ĉiunacia, la L. K. K. petas samideanojn en ĉiuj landoj, ke ili penu fari interkonsenton kun la gazetoj de sia urbo pri publikigo de antaŭ-kongresaj novaĵoj, kiujn la samideanoj povos fari laŭ la komunikoj, kaj de postkongresa raporto, kiun la L. K. K. verkos kaj sendos al patintoj. Ankaŭ ilustraĵojn de la kongreso kaj la kongresurbo la L. K. K. laŭ peto sendos, kondiĉe ke ili estos represataj en naciaj ilustritaj gazetoj.

17. Loĝigo. Pri la vivkostoj en Finnlando ni raportos detale en venonta komunikilo. Ĉi tiun fojon ni kontentigas ie la informo, ke loĝeio kaj manĝo en Helsingfors-a hotelo kostas 50—100 Fmk por persono kaj tago.

18. Dato de la kongreso. Post interkonsiliĝo kun K. K. K. la L. K. K. decidis, ke la kongreso okazos la 6.—12. de aŭgusto 1922.

19. Alveturo. Ĉar la kongreso ĉi tiun fojon okazos en lando, kien ĉiuj eksterlandanoj devos veni trans la maro, la L. K. K. atentos pri bona aranĝo de la alveturo de la ŝipoj La intertraktadoj kun la **Finna Varioŝtina Komunio** ankaŭ jam kondukis al min-civa interkonsento, laŭ kiu ni jam nun povas doni la jenajn informojn.

El Stettin (verŝajne ŝipo »Ariadne«) eliros merkredon la 2-an de aŭgusto alvenante Helsingforsen vendredon la 4an. Vojaĝprezoj maksimume en la Klaso 720.— Fmk kaj en 11a Kl. 640.— Fmk (ĉio kun manĝo). Krom tio ekzistas eblecoj, ke speciala ŝipo povos veturi el Lübeck vendredon la 4an de aŭgusto Helsingforsen lundon la 7an frumatene. Prezoj samaj kiel el Stettin.

La vojaĝprezoj ĉi tie donitaj estas specialaj rabatprezoj por la partoprenantoj de la XIV-a kongreso. Ili inkludas liton en kajuto kaj manĝon dum la tuta vojaĝo. La prezoj estas maksimumaj; ebleco ekzistas, ke ili estos ankoraŭ iom malaltigitaj.

La samideanoj, kiuj deziras uzi ĉi tiujn ŝipojn, devos pri tio informi al L. K. K. aŭ al la karavan-gvidantoj en la diversaj landoj plej malfrue 6 semajnojn antaŭ la ekveturo. La L. K. K. esperas, ke ĝi baldaŭ povos sciigi nomojn de karavan-gvidantoj ankaŭ en aliaj landoj kaj petas personojn interesigintajn fariĝi tiaj plej baldaŭ informi pri tio al la L. K. K.

Koncerne la forveturon el Helsingfors post la kongreso, la L. K. K. ankaŭ povas sciigi, ke ŝipoj al Hull kaj Stettin foriros sabaton la 12an de aŭgusto vespere, kaj al Stockholm dimanĉon la 13an matene, kiujn okazojn do povos uzi la samideanoj, kies libertempo ne vermesas pli longan restadon en Finnlando. La ŝipoj elveturas ĉiusemajne la nomitajn tagojn.

La Loka Kongresa Komitato.

Adreso: Poŝta (ankaŭ por monsendoj): XIV-a Kongreso de Esperanto, Helsinki, Finnlando. — Telegrafa: Esperanto, Helsingfors.

DIVERSAĴOJ

Esp-a Klubo en Plzeň. La 18. II. 1922 okazos komitatata kunveno. Programo: 1. Raportoj de komitatanoj. 2. Preparaj laboroj por ĝenerala kunveno. 3. Raporto pri »La Progreso«.

Ĝenerala kunveno de Esp-a Klubo en Plzeň okazos la 25. II. 1922. Programo: 1. Raporto el lasta ĝenerala kunveno. 2. Raportoj de komitatanoj. 3. Raporto pri »La Progreso«. 4. Elekto de nova komitato. 5. Starigo de membraj kotizaĵoj. 6. Liberaj proponoj.

Ambaŭ kunvenoj okazos je la 20a horo de citita dato en kunvenejo, restoracio Svoboda, Perlova ul., Plzeň.

Laberista Asocio Esp-a, Plzeň-Letná, aranĝis ĝeneralan kunvenon dimanĉe la 5an de februaro 1922. Nova komitato: K-do A. Rendl, prezidanto, K. Mladý, sekretario. Konversaciaj kunvenoj estas aranĝataj ĉiumerkrede je la 19a horo en restoracio »U Mozrů«. Ĉiuj leteroj por Asocio estu adresataj al K. Rendl, Plzeň-Letná, Kukačka 40, Ĉeĥoslovakio.

Lid. Universita Masarykova en Ostrava. En Vitkovice gvidas s-o Janečka du kursojn, por komencantoj kaj por progresintoj.

Propagandaj poŝtkartoj por Ĉeĥoslovakoj eldonis s-o R. Fridrich, profesoro, Královo Pole, Purkyňova 79. Ili enhavas esp. gramatikon. Prezo: 50 pecoj kostas 14 Kĉ, 500 pecoj 100 Kĉ, 1000 pecoj 170 Kĉ. Ekspedo sekvas nur post alsendo de mono.

Instruado de Esperanto en burĝaj lernejoj de Ĉeĥoslovaka respubliko. Ĉiam fervora samideano,

s-ro Wunsch, instruisto en Karlovy Vary, skribas al ni: »La ministerio de instruado en Ĉeĥoslovaka respubliko permesis la instruadon de Esperanto sole en duagrada kaj komercaj lernejoj. Sekve de tio la Esperanta Societo en Karlovy Vary (germane Karlsbad), postulis permeson instruadi Esperanton ankaŭ en burĝaj lernejoj. La nomita societo ricevis respondon de la ministerio sub la n-ro 1/A—2954/106.920, en kiu oni atentigas la societon pri la dekreto n-ro 104248/21 de la 3. novembro 1921, laŭ kiu la instruado de Esperanto povas esti permesata ankaŭ en la burĝaj lernejoj sub la kondiĉoj, ke la lokaj faktoroj zorgos pri la eventualaj elspezoj kaj se la kapabla instruisto estas disponebla.

Lidová Universita Husova en Plzeň aranĝis por poŝtaj oficistoj esp. kurson, kiun vizitas 32 gelnantoj. En Plzeň oni ankaŭ aranĝis kurson por progresintoj, kiun vizitas 22 gelnantoj. En ambaŭ kursoj instruas s-o B. Tittl. Granda merito pri ilia efektiviĝo apartenas al s-o Votrúbec.

Esperanto disvastiĝas ne nur en urboj, sed ankaŭ en vilaĝoj. En Kozlany apud Plzeň estas aranĝata esp. kurso, kiun vizitas 65 gelnantoj. Instruas s-o Přibáň Jos. En Královice komencis nova kurso, vizitata de 45 gelnantoj. Ĉiudimaneĉe instruas s-o Přibáň Jos. Novaj kursoj estas preparataj en Štáhlavy, Staňkovo kaj Doudlevice.

En »Poštovní Obzor« gvidas skriban kurson s-ino M. Hemerová-Cimrová el Praha. Intereso pri tiu kurso estas rimarkinda.

En stacidomo **Josefov-Jaroměř** s-ro Jar. Prokop faris por fervojistoj la 13. I. 1922 paroladon pri Esp. kaj nun li en tiu sama stacidomo gvidas kurson, kiun partoprenas preskaŭ 100 fervojistoj.

Laborista esp. Asocio en Plzeň aranĝis dimanĉe la 22. de januaro 1922 antaŭtagmeze ĝeneralan kunvenon en laborista domo »Peklo«. Ĉeestis delegitoj el sekvantaj lokoj: Štáhlavy, Staňkovo, Doudlevice, Újezd, Doubravka kaj Esp. Klubo Plzeň. Laŭ raportoj de komitatanoj ni rimarkis, ke nia asocio, malgraŭ granda penado ne atingis plenan sukceson, tamen nia stato pliboniĝas kaj ni malgraŭ tio iras antaŭen. Dum pasinta jaro oni aranĝis en Plzeň kaj ĉirkaŭaĵo 14 kursojn. Laŭ raporto de kasisto oni enspezis Kč 11.242.30 kaj elspezis Kč 8.064.95. Oni elektis jenan komitaton: Pech Jos., prezidanto; Vašek Fr., sekretario; Hovorka Jos., kasisto. Oni traktis ankaŭ pri fondo de universala asocio por laboristoj kaj estis elektita komisiono, kiu preparos ĉion necesan.

Esp-a societo en Plzeň (germane Pilsen), sekcio de ligo »Germana Esperantisto« en Ĉeĥoslovakio, estis fondita la 1an de aŭgusto en jaro 1921 pere de samideano Dolanský el Nýřany (apud Plzeň), kiu prenis sur sin la taskon, disvastigadi inter germanoj de okcidento de Bohemio nian lingvon Esperanto. — En januaro de nuna jaro oni aranĝis ĝeneralan kunvenon, dum kiu nomita samideano sciigis ĝisnunaj sukcesoj de tiu sekcio. Oni gvidis du kursojn en Plzeň, kiujn vizitis 32 gelnantoj, el kiuj 23 aliĝis kiel membroj al tiu societo. Samtempe oni gvidis 2 kursojn en Stodo, kiujn vizitis 48 gelnantoj. Kelkaj kursoj estas preparataj, nome en Plzeň, Stodo, Chotěšov, Dobřany kaj Litice. Kunvenejo de »Esperanta societo Plzeň« troviĝas en Plzeň, Hálkova tř., restoracio de s-o Hlava. Ĉiuj raportoj estu adresataj al s-o Fr. Dolanský, Nýřany 143, apud Plzeň, aŭ al s-o Karel Knott, Plzeň, Emilova 14.

• **»Liberiga Stelo«** Sennacieca Asocio Tutmonda en Plzeň. Laŭ la decido de la ĝenerala kunveno, kiu okazis la 9. X. 1921 en restoracio »U Zahradníčků« en Plzeň, ni decidis nomi nian asocion **»Lab. Asocio Esp. en Plzeň«**. Ĉar ne estas permesita sekcio de eksterlanda ligo, ni verkis novajn statutojn. Ankaŭ ni sciigas al ĉiuj esperantistoj, ke ni ŝanĝis nian kunvenejon, pro tio ni petas niajn gekorespondantojn, ke ili adresu ĉiujn sendaĵojn al: »Laborista Asocio Esperantista«, restoracio Mach (Dobry), Škvrňanská tř., Plzeň.

Laborista Asocio Esperantista (Arbeiter-Esperanto-Verein), Plzeň, Škvrňanská třída, restoracio Mach, aranĝos la 19. II. 1922 antaŭtagmeze je la 1/9. horo ĝeneralan kunvenon. Oni traktos pri 2a kongreso de labor. asocio »S.A.T.«. Ankaŭ aliaj punktoj de programo estas gravaj, pro tio alvenu ĉiu ano! Delegitoj de diversaj societoj esp. estas kore invitataj.

Printempa Foiro de Frankfurt a. M. Foir-oficejo dissendas esperantajn invitilojn anoncantaj, ke en la semajno de la 2.—8. de aprilo 1922 oni aranĝos la 6an Internacian Foiro.

Nur Antaŭen! Esperantista marŝo kun notoj en formo de l' duobla poŝtkarto, dediĉita al la XIII-a Esperantista Kongreso en Praha. — Komponita de nia samideano s-ro Josef Horák, kapelestro de Ĉeĥoslovaka infanteria regimento n-ro 18-a en Plzeň, al la vortoj de l' samnoma poemo verkita de nia mortinta esper. poeto d-ro St. Schulhof en Pardubice. — Ĉi tiu belega marŝo tre bone taŭgas kiel por la ekskursantaj esperantistoj, tiel ankaŭ por la esper. festoj kaj kunvenoj. Dek pecoj kostas 6 kronojn, cent kostas 50 kronojn sen a-franko. Oni skribu al la administracio de »La Progreso«, Plzeň, Poděbradova třída n-ro 6.

BIBLIOGRAFIO

Esperanto-Krestomatio. Eldonis instruisto Taubman, redaktoro de »La Marto«, Bor u Ĉ. Lipy, Bohemio. 80 paĝoj. Prezo Kč 6.12. Tiu ĉi libro rekomendita de Esp. Literatura Asocio, enhavas esperantajn artikolojn, facilajn kaj malfacilajn, kiuj estas ordigitaj tiamaniere, ke oni trastudas en ili tutan gramatikon. Pro tio ĝi bone taŭgas por komencantoj eĉ por progresintoj.

Edmond Privat: Karlo. Sepa eldono. Eldonis Esperanto-Verlag, Berlin S 59. Prezo 5.— germ. markoj, por bonvalutaj landoj 7.50 germ. markoj. Tiu ĉi 48-paĝa libreto estas malgranda romano, priskribanta en 20 ĉapitroj la vivon de Karlo de lia naskiĝo ĝis lia edziĝo. Ĝia stilo estas simpla, sed bonega, vere klasika, pro tio ĝi tre bone taŭgas kiel legolibro por lernado de esperanto.

Poŝkalendareto por Esperantistoj 1922. Eldonis F. Ellersiek, Berlin S 59. Prezo 3.— germ. markoj. Sur 64 paĝoj ĝi enhavas portreton de Dro Zamenhof, esperantistan himnon, sciindaĵojn pri la historio de esp., pri organizaĵoj esp. kaj pri la lingvo esperanto. Plej granda manko de ĉi tiu kalendareto, kaŭzita certe pro altaj eldonkostoj kaj pro intenco prezenti al esperantistaro kiel eble malmultekostan kompension, estas, ke ĝi ne estas bindita kaj pro tio ĝi ne konvenas kiel poŝkalendareto, sed tamen ĝi estas praktika libreto.

Elementar-Lehrbuch zur gründlichen Erlernung der internationalen Hilfssprache **Esperanto** de Guido Otto. Eldonis Esperanto-Verlag, Friedrich Ellersiek, Berlin S 59. 4-a eldono. 132 paĝoj. Prezo 12.— germ. markoj. Por germanaj samideanoj bona kaj necesa lernolibro, kiun oni povas uzi en lernejoj, kursoj, eĉ por memlernantoj. Ĝi enhavas ankaŭ vortarojn esp.-germanan kaj germ.-esperantan.

KORESPONDADO.

Ĉeĥoslovakio: Bystřice Hostýn. s-o Al. Klabčka, poŝtestro, deziras interŝanĝi PM, sendu rekom. 20-100 PM de via lando kaj vi ricevos saman kvanton da ĉeĥoslovakaj PM.

Knihy, jež možno obdržeti v naší administraci

- pouze proti placení předem, na zaslanou složenku, po objednávce s připočtením porta, jiných knih nevedeme
- B. Tittl: Slovník esperantsko-český, vázaný Kč 7.50
 - Slovník esperantsko-český, brož. Kč 5.—
 - Časopis »La Progreso«, roč. 1918 Kč 4.50
 - Časopis »La Progreso«, roč. 1919 Nroj. 5-10 Kč 4.—
 - Časopis »La Progreso«, roč. 1920 Kč 16.—
 - Časopis »La Progreso«, roč. 1921 Kč 20.—
 - Tittl: Krátká mluvnice Esp. Kč 0.30
 - Čejka-Krumpholz: Malá mluvnice Esperanta Kč 3.10
 - Šupichová: Esperanto. Slovník a mluvnice, doporučena ministerstvem vyučování pro kursy a samouky. Kč 8.80
 - Novák: Čeŝa literaturo. Kč 8.—
 - Dr. Absolon: Moravia Karsto. Kč 7.50
 - Esp. movado en Moravio Kč 4.—
 - Kamaryt: Úvahy o jaz. mezinár. Kč 0.80
 - Jazyk všeslovanský a Esp. Kč 0.20
 - »O dvoji pravdě« Kč 14.—
 - por niaj abonantoj Kč 12.—
 - Vortoj de Zamenhof, na lepším papíře Kč 6.—
 - Sherlock Holmes Kč 4.50
 - Božena Němcová: »Babička«, fino de traduko »Avineto« Kč 2.50
 - J. S. Machar: Benedek Kč 3.60
 - Gvidlibro tra Praha Kč 3.60
 - Výtah z Kotzina: Na obranu esper. Kč 2.40
 - Co je esperanto Kč —.20
 - Krestanov: Bulgara lando kaj Popolo Kč 20.—
 - E. Privat: Vivo de Zamenhof Kč 48.—
 - Por kongresaj glumarkoj 100 Kč 10.—
 - Esper. insignoj »U. E. A.« Kč 8.—
 - Esper. insignoj malgrandaj pingloj Kč 4.—
 - Esperanta insigno E. broĉoj Kč 5.—
 - Esperanta kantaro. Tekstaro de diversaj popol. kantoj Kč 3.—
 - muzika eldono Kč 7.—
 - La Espero. Himno Esperantista. Poezio de Zamenhof, muziko de Ménil, por fortepiano Kč 4.—



Samideanoj el landoj de centra kaj orienta Eŭropo povas aboni

„Hispana Esperantisto“

ĉe so. F. Šilha, Praha II., 460 u Karlova.
La gazeto estas ilustrata. 16 paĝoj, kun riĉa kaj interesa enhavo ankaŭ pri Ĉeĥoslovakio.
Jara abono 45.— Kč.



Kolekto de »La Esperantisto«. N-ro 1.

ZAMENHOFA KURSO DE ESPERANTO POR ĈEĤOJ

ENHAVO:

Antaŭparolo de D-ro L. L. Zamenhof. Gramatiko, Fundamenta ekzercaro kun ĉeĥa traduko. Esperanta-ĉeĥa radikovortaro. Legaĵoj. Anoncoj.

32 dukolone presitaj paĝoj, gazeta formato (30×21 cm), eldono 20.000 ekzempleroj. Prezo Kč 1.—.

Ĉeĥdeponejo: R. Ĉech, vicdel. de U. E. A., Wien IX., D' Orsaygasse 7/23.

Via horloĝo funkcios precize se vi ĝin donos por rebonigi al

FR. NOVÁK, horloĝisto en Praha I. Malé nám. 10.



Horloĝoj. - Juveloj. - Esp. insignoj de esp. klubo en Praha. - Esp. glumarkoj, kolekto da 12 div. specoj. 100 pecoj Kč 4.—, afrankite Kč 5.—, 1000 pec. Kč 35.—, afrankite Kč 37.50.

LA ESPERANTISTO.

ORGANO DE ESPERANTA UNIVERSITATO POPOLA

Dediĉata al la interna ideo de l' Esperantismo.

Jara abono: 8.— Kč.

Redakce: WIEN II., POSTAMT 34.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: In. Gross, Plzeň, Houškova ul. 32. Presis laborista presejo, Plzeň.